

**Demarŝa Komitato de ASTURA ESPERANTA ASOCIO, de maldekstre al dekstre: Santiago Mulas Gallego, Adonis González Meana, Faustino Castaño Vallina kaj Ildefonso Domínguez Losada.**

La personoj menciitaj paĝo-marĝene de tiu akto estis nomlisto konstituita de la membraro de la E-rondo, estante ĉekape la nomo de Alberto Menéndez, kiu, kvankam ne plu kiel aktivulo, tamen ĉiam restis kun la gesamideanoj de ĉi tiu urbo kaj akompanis ilin en la gravaj momentoj de la esperantista kolektivo.

De tiam, la Demasrŝa Komisiono plenumis sian taskon: fari la necesajn demarŝojn por la oficialigo aŭ legalizo de la nova asocio. La sekva noto en la aktlibro estas inventaro de la havaĵoj de la asocio. Fakte, Astura Esperanto Asocio heredis ĉion apartenínta al la Grupo Esperantista Jovellanos, tiel en kio koncernas al la personaro kiel al ĉiutipaj havaĵoj. **HELECO** daŭre estis la presorgano de la asocio, portante ekde ties 9-10a numero (kiu raportis pri la 39a Hispana Kongreso de Esperanto), indikon pri ties aparteno al **AEA**.

Notindas ke ĉiuj ĉi ŝanĝoj kaj eventoj ne interrompis la okazigon de kursoj de Esperanto en nia sidejo.

La 22an de majo de 1980, plenuminte sian komision la Demarŝa Komitato, kunvenis la membraro de la asocio por elekti novan estraron. Le elektita gvidantaro de **AEA** estis:



**Luis Muñiz**

- Prezidanto: Santiago Mulas Gallego.
- Vicprezidanto: Adonis González Meana.
- Sekretario: Luis Muñiz Martínez.
- Kasisto: Ildefonso Domínguez Losada.
- Kontisto: Manuel Fernández Suárez.
- Bibliotekisto: Julio Argüelles García.
- Voĉdonantino: Pilar Alonso Moro.
- Voĉdonanto: Antonio Román Cantón.
- Voĉdonanto: Gervasio Colunga Fernández.
- Voĉdonanto: Faustino Castaño Vallina.
- Voĉdonanto: José Ordieres Dacosta.

Inter nomoj jam konataj de antaŭaj komitatoj aperas iu nomo de nova samideano varbita el la lastaj kursoj. Sed speciale menciinda estas la ŝanĝo en la sekretarieco de la grupo. La akto de tiu kunsido venas jam subskribata de la nova Sekretario: Luis Muñiz Martínez. Lia nomo aperis jam en nia historio en rilato kun aliaj taskoj en la E-rondo. Sed nun ni volas reliefigi la fakton ke aperis jam alia Luis Muñiz en nia historio kiam ni menciis la samideanojn kiuj aperas en tiu antikva foto de la jaro 1929. Tiu alia estis patro de la nuna Luis Muñiz kaj krome li estis vivanta ankoraŭ en tiu epoko kiun ni priraportas. Ne estas ofta okazaĵo ke patro kaj filo samtempe membras ĉe esperantista rondo.

Tiu ŝanĝo en la sekretarieco ne signifis malpliintensiĝo de la aktivado de Faustino Castaño. Fakte, de tiam li okupiĝis pri la biblioteko de la asocio kaj krome gvidis E-kursojn.

Por la lerno-jaro 1980-1981, **AEA** organizis du kursojn de Esperanto, la Baza Kurso estis gvidata de Faustino Castaño, kaj Santiago Mulas gvidis la la Progresigan Kurson, al kiu oni invitis la gelernintojn de la antaŭaj jaroj.

Ildefonso Domínguez, krom lia komitata tasko je kasisto, daŭre okupiĝis ankaŭ pri la ellaborado de la revuo **HELECO**. Tiam la bulteno ne estis mult-paĝa, sed ĝi ofte aperadis; ĉiu du-monato estis akurate eldonita nova numero de la revuo. La ekzempleroj, presitaj per foto-kopiado, estis senditaj al ĉiu membro de la asocio kaj ankaŭ al diversaj E-grupoj landaj kaj eksterlandaj same kiel al kelkaj korespondamikoj de la membroj de nia asocio. Foje el tiuj korespondamikoj ni ricevadis kunlaboraĵojn por la revuo, fakte, estis en ĝi iu sekcio nomata "Niaj geamikoj el..." kaj tie estis publikigitaj tiuj kunlaboraĵoj. Alia kutima sekcio de **HELECO**, kiu daŭre ekzistas ankoraŭ, estis tiu nomata "Kuirante kun Pilar". Tie oni metis, kaj daŭre oni metas, kuirreceptojn de samideanino Pilar Alonso Moro, membro de nia asocio.